

## Ĝeneralaj kondiĉoj pri uzado kaj reguloj pri privateca politiko de Adresaro.org

### A) Ĝeneralaj informoj:

1. Adresaro.org estas servo de Esperanto Internacia; fondaĵo kiu ĉefe okupiĝas pri Esperanto-informado kaj Esperanto-instruado.
2. Esperanto Internacia distanciĝas komplete je la respondeco de fremdaj enhavoj kaj ligiloj.
3. Kaze ke uzantoj enmetas ne permesitajn informojn, Esperanto Internacia havas la rajton forigi la enhavon aŭ ŝanĝi ĝin laŭsence.
4. Esperanto Internacia havas la rajton aliri la profilojn por korekti informojn aŭ lingvaĵon.
5. Esperanto Internacia ne transprenas iun ajn respondecon rilate al la enhavo de la profiloj de uzantoj (speciale adresinformoj, aktualeco k. a.).
6. Esperanto Internacia ne respondecas se aliĝas personoj, kiuj ne havas la eventuale necesan permeson de la gepatroj (Vidu B3!).
7. Esperanto Internacia rajtas forigi la servon en iu ajn momento. Uzantoj ne havas la rajton postuli daŭrigon de la servo aŭ postuli rekompenson pro la forigo de la servo.
8. Esperanto Internacia havas la rajton forbari aŭ forigi uzantojn, se ili agas kontraŭ la spirito de ĉi tiuj kondiĉoj aŭ misuzas la servon.
9. Esperanto Internacia havas la rajton forbari aŭ forigi uzantojn, se la kontaktdatenoj ne estas aktualaj.
10. Esperanto Internacia ne respondecas se uzantoj aŭ eksteruloj misuzas la servon intence aŭ malintence. Same ĝi ne respondecas, se pro misuzo de la servo aŭ teknikaj kaj programaj eraroj, perdiĝas informoj, aldonitaj de uzantoj. Ĝi rekomendas la uzon de kontraŭvirusaj aŭ kontraŭspionaj programoj.
11. Esperanto Internacia rajtas kolekti statistikajn kaj teknikajn informojn pri la uzantoj. La koncernaj informoj ne estas transdonitaj al aliaj. Ni garantias la privatecon de ĉiu uzanto.
12. Esperanto Internacia aplikas por la datenprotektado (reguloj de privateca politiko) la severajn regulojn de ŝtatoj en Eŭropa Unio (speciale Germanio).
13. Esperanto Internacia rajtas ŝanĝi aŭ korekti la kondiĉojn informante la uzantojn en la retpaĝo aŭ per sendo de persona informo. La regulojn pri privateco, ĝi nur rajtas ŝanĝi, se la bazaj rajtoj de la uzantoj ne estas tuŝitaj. Ĉe ŝanĝo de la reguloj pri privateco ĝi devas informi la uzantojn en la retpaĝo minimume 6 semajnojn antaŭ la ŝanĝo.
14. Esperanto Internacia havas la rajton transdoni la servon.

## B) Rajtoj kaj devoj de uzantoj:

1. Personoj, kiuj registriĝas ĉe adresaro.org akceptas la regulojn pri uzado kaj regulojn pri privateco (datenprotektado).
2. Personoj, kiuj registriĝas ĉe adresaro.org en la kategorio “simpatianto” aŭ “amiko” fariĝas membro de la neregistara fondaĵo, Esperanto Internacia kaj akceptas ĝian statuton.
3. Por registriĝi ĉe adresaro.org oni devas havi la necesan aĝon laŭ leĝo de la loĝlando de la registranto, sed oni devas esti minimume 7-jara. Personoj pli aĝaj, per la akcepto de la aliĝo, konfirmas ke ili aŭ mem povas fari la koncernan deklaron aŭ ke ili havas la eventuale bezonatan permeson de la gepatroj (en plej multaj landoj ĝis la 18-a vivojaro).
4. Ĉiu persono rajtas nur havi unu konton ĉe adresaro.org.
5. La uzantoj mem atentis pri ĉiuj privataj informoj. Ne estas permesite transdoni la personan aliron ĉe adresaro.org al aliaj personoj.
6. Ĉiu uzanto mem atentis pri la sekureco. Oni instalu programon kontraŭ interretaj atakoj (ekz. virusoj aŭ spionprogramoj). Oni atentis ke ligiloj ne iru al paĝoj infektitaj per virusoj.
7. Ĉiu uzanto devas respekti la internaciajn kaj naciajn leĝojn. Ne permesite estas la enmeto de enhavoj aŭ ligiloj: rasismaj, pornografiaj, homofobiaj, militistaj, kontraŭleĝaj, direktitaj kontraŭ la homaj rajtoj aŭ similaj. La informoj devas esti veraj. Ne permesatas trompoj, mensogoj, personaj atakoj kontraŭ aliaj homoj kaj similaj.
8. Uzantoj ne rajtas enmeti skriptojn, kiuj povas kaŭzi damaĝon al aliaj uzantoj aŭ al la retpaĝaro.
9. Ĉiu uzanto rajtas protekti la proprajn datenojn aŭ ne enmeti ilin (se ne temas pri devigaj informoj). Tamen ne estas permesite enmeti malverajn informojn.
10. La uzantoj devas aktualigi datenojn laŭeble rapide. Tio speciale validas por la retpoŝtadreso kaj por la kontakteblecoj (ankaŭ por la administracio de Esperanto Internacia). Tio validas ankaŭ por ofertoj al vojaĝantoj aŭ deziroj.
11. La uzantoj devas laŭeble rapide respondi iun kontaktpeton, se ĝi plenumas la kondiĉojn de adresaro.org.
12. La uzantoj sin devigas ne uzi informojn de la retpaĝaro por aliaj celoj, nek personaj, nek komercaj.
13. La uzantoj sin devigas agi ĉiam respektive, dece kaj ĝentile.
14. La uzantoj sin devigas uzi la retpaĝaron nur por la menciitaj celoj.
15. La uzantoj akceptas la specialajn kondiĉojn pri la uzo de la kontaktformularo.

### C) Specialaj kondiĉoj pri la uzo de la kontaktformularo:

1. La uzantoj uzu la kontaktformularon prioritare (antaŭ aliaj kontakteblecoj). Tio ne validas por vojaĝantoj, kiuj urĝe devus kontakti uzanton, kiu ofertas turisman servon.
2. Mesaĝoj, senditaj per la kontaktformularo enhavu nur la necesajn informojn por kontakti la alian personon. Oni ne uzi ĝin por privataj leteraj interŝanĝoj. Oni petu por plia komunikado kontaktinformojn de la alia uzanto.
3. Escepte la administracio de Esperanto Internacia havas la rajton legi mesaĝojn, kiuj estas senditaj per la kontaktformularo por eviti spamon kaj kontroli la permesitan uzadon.
4. Skribante per la kontaktformularo al aliaj personoj oni skribu afable kaj ĝentile. Oni nepre respektu aliajn homojn kaj kulturojn.
5. Uzantoj ne rajtas amase skribi al aliaj uzantoj per la kontaktformularo.
6. La kontaktformularo nur rajtas esti uzita por celoj, kiujn la alia uzanto vere ofertas. Do oni ne rajtas skribi pri senkosta tranoktebleco, se la koncerna uzanto nur serĉas korespondamikon.
7. Se iuj uzas la kontaktformularon por nepermesitaj celoj (spamo, maldecaj ofertoj k. a.) la uzanto bv. informi la administracion de Esperanto Internacia
8. Uzantoj ĉiam respondu (laŭeble ene de 3 tagoj) al mesaĝoj ricevita per la kontaktformularo, uzante laŭeble la personan retpoŝtadreson. Nur se ne volas malkaŝi la personan retpoŝtadreson oni uzu ankaŭ la kontaktformularon. Kompreneble oni ne devas respondi, se la koncerna mesaĝo neniel riltas al la celoj de la adresaro aŭ al la propraj ofertoj kaj deziroj.
9. El misuzo de la kontaktformularo povas sekvi forbaro aŭ forigo de la koncerna persono.

Versio de:  
2011-12-01